# La Suda Kruco

Organo de la Australiaj Esperantistoj

Reda'cio-Administracio:
Box 1367, Elizabeth-st P.O.
Melbourne (Aŭstralio)

Abono (por dek du numeroj):
Aŭstralio: 3 shilingoj.
Ekster Australio: 3 sh. 9 p.
au 18 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 shilingo au 4 respondkuponoj.

N-ro 2 Melburno (*Melbourne*), Australio Augusto, 1920

PUBLIC LIBRARY -4 AUG 1921 OF VICTORIA

## AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATON

### ANNUAL MEETING.

The annual general meeting of the Australian Esperanto Association was held in Melbourne on the 2nd July. There was a moderate attendance. The president (Mr. J. G. Pyke) was in the chair.

The following groups were represented by delegates:—The Komercia Esperanta Klubo (Melbourne), Sydney, Hobart, Perth and "Espero" (Mont Albert, Melbourne).

The report and balance-sheet of the secretary-treasurer (Mr. R. R. Rawson) were adopted. The report was one of the most encouraging yet presented, showing that Esperanto, both in Australia and abroad, was making valuable and steady progress. The balance-sheet showed that the Association was—well, solvent.

The principal business of the meeting was the discussion of a motion arising out of the Sydney congress, which had by a resolution expressed its wish that the former Melbourne Esperanto Society should be revived, and that the central Esperanto body of Australia should be a federal commttee, consisting of delegates elected by each of the Australian groups.

With a view to carrying out this wish, a motion was moved by Mr. M. Hyde altering the first rule of the constitution so as to change the name of the A.E.A. back again to "The Melbourne Esperanto Society," and substituting for the remaining rules the rules of the former M.E.S. The motion was seconded by Miss E. Alleyne Sinnotte (Mont Albert).

Mr. A. R. Cohen moved a motion of privilege, seconded by Mr. W. J. Drummond, securing the possession of the movable property of the A.E.A. (books in stock, lending and reference library, furniture, etc.) to the M.E.S., in the event of the proposed change taking effect. This was agreed to.

Mr. Hyde spoke at length on the motion for altering the constitution, pointing out that the change proposed —to make the A.E.A. in name what it was in effect, namely, the Melbourne group—was strongly desired by the majority of the members of the Sydney congress, as well as by the groups of Sydney, Hobart, Perth and Mont Albert. The present constitution had been adopted as a provisional measure only, under circumstances widely differing from those which had now come into being. By separating their purely local functions from those affecting Esperanto throughout Australia, they

would remove a source of legitimate complaint from the affiliated groups and obtain the co-operation of the the groups, which had up till now co-operated under the present constitution only for the purpose of ending it.

A letter from Mr. E. A. Pryke, of Barraba, N.S.W., opposing the change, was then read.

Mr. L. E. Thomson opposed the change, saying that the present constitution had not had a fair trial, and that the groups had not received a fair share in the government of the Association only on account of their own failure to make use of the opportunities offered them.

Mr. Cohen asked permission to move an amendment, but Mr Thomson claimed that all amendments were out of order, as 60 days' notice had not been sent to the groups and members; this view was supplied by a ruling of the chair. On Mr. Cohen's motion, the meeting disagreed with the chairman's ruling. Mr. Pyke then left the chair, which was taken by the vice-president (Mr. Hyde).

Mr. Cohen then moved an amendment to the first part of Mr. Hyde's motion, substituting the name "Australian Esperanto Association" for "Melbourne Esperanto Society" in the first clause of the proposed constitution. This was carried.

On the discussion on the second clause ("Objects of the Association") Mr. Thomson moved for the deletion of the present wording, the insertion of the wording of clause 18 ("Alteration of the Constitution") and the appointment of a special committee to draw up a draft of a revised constitution to be submitted to the next Australian congress at Hobart. This was ruled out of order, but the meeting disagreed with the chairman's ruling.

Mr. Redfern then moved that the port in one month's time, and that the meeting proceed to the election of office-bearers. This was carried, with an amendment that the committee should report in three months' time. Mr. Pyke then resumed the chair, and the office-bearers were elected.

Though the debate was keen, it was carried on in a friendly spirit, and though the practical result of the meeting appears to be only that the name of the Australian Esperanto Association has been changed to the Australian Esperanto Association(!), the general feeling is that a satisfactory settlement of the difficulty is in sight.

---

## Helpu La Infanojn

From the Klosterneuburg section of the Austrian Tourist Club we have received an appeal for money for the children of the Vienna Forest district. This society has provided the children each year with clothing, boots and other necessaries, but now, owing to lack of money, the society cannot continue this good work, and appeals to Esperantists throughout the world for help. The secretary of the A.E.A. will be glad to receive donations and forward them to the society; his address is—Box 731, Elizabeth street P.O., Melbourne.

---

## ESPERANTO IN RUSSIAN SCHOOLS

The most important forward step that Esperanto has made for some time is the decision of the Russian People's Commissaries for Education, reported in Berne "Esperanto," to introduce Esperanto into all the schools of the Russian republic.

Some time ago the Government appointed a special commission to consider this matter, and the commission arrived at its decision after several months of discussion. Detailed information of the commission's programme is not yet to hand, but it is known that the teaching of Esperanto as a compulsory subject has already been begun in the schools of Petrograd, Moscow, Tver, Orel and Smolensk.

With a view to furthering the study of Esperanto, according to the Russian official journal "Izvestya," the Government has set aside a special building in Moscow, called the "Esperanto-Domo," which will be used as a teaching centre. It will also contain a library, an information bureau, and a book distribution bureau. The various Esperanto societies of Moscow have been authorised to institute a professorship of Esperanto at this establishment, which is under the direction of Sinjoro P. Evstifeyef, a well-known Russian Esperantist and a member of the Esperanto Akademio.

Esperanto is of course, as always, politically neutral, as much so as wireless telegraphy or the aeroplane, and its adherents throughout the world

clude people of all political opinions. In undertaking the teaching of Esperanto the Soviet Government has followed the lead of educational authorities in England, Scotland, France, Germany, Spain, Brazil, Portugal, America and elsewhere; in various places in these countries Esperanto has been officially taught for many years past.

## CHURCH SERVICES IN ESPERANTO.

The use of Esperanto for church services is not new or uncommon. Australian samideanoj who were at the second congress in Melbourne will remember the impressive evensong in Esperanto which was conducted by the Rev. W. D. Kennedy in the Old Cathedral of St. James; every word—hymns, with a specially trained choir, psalms, solo, prayers, sermon—was in Esperanto.

During the British congres in Birmingham recently, holy communion was for the first time celebrated in Esperanto, on two occasions, once in the Cathedral and once in another church. This was due to the efforts of the active Anglican Eklezia Esperantista Ligo, which is publishing an Esperanto translation of the Book of Common Prayer, of which the most used parts (morning and evening prayer, litany and communion service) have already appeared. The Bishop of Birmingham is a strong supporter of the Esperanto movement.

"Esperanto" contains a report of a Diservo en Esperanto at Vienna, where the Catholic Archbishop has also given his support to Esperanto.

## THE FINNISH GOVERNMENT USES ESPERANTO.

The Finnish Foreign Office makes use of Esperanto officially at its embassies at Stockholm, Dresden, and Tokio. The recently appointed ambassador to Japan, Professor Ramstedt, of Helsingfors, is a prominent Finnish Esperantist. Reports show that there are classes of Esperanto at many schools and colleges throughout the country. The Finnish Esperanto Institute has recently received a subvention from the Government.

## ESPERANTO IN COMMERCE.

Several of the great international fairs which are being held in Europe in an attempt to renew normal commercial relations are making use of nia lingvo, both for advertising the fairs beforehand and for the convenience of foreign visitors during the time of the fair itself. Among them are the Finnish fair and industrial exhibition at Helsingfors; the international fair of Frankfurt-on-the-Main (for the second time, owing to the successful use of Esperanto at the first fair); the fairs of Basle (Switzerland), Leipzig and Lyons, and the second specimen fair of Padua (Italy).

An important Melbourne firm, having on hand a cargo of foodstuffs at Le Havre which could not be sold for some time owing to exchange difficulties, and being impressed with the value of Esperanto as a means of commercial communication, has cabled to the Belgian Esperanto headquarters, inviting inquiries for the goods.

## NEW OFFICERS OF THE A.E.A.

At the annual general meeting of the Australian Esperanto Association on the 2nd July, the following office-bearers for the year 1920-21 were elected:—

President, Mr. Maurice Hyde, F.B.E.A.; vice-presidents, Mrs. Marion Purnell, F.B.E.A., and Mr. A. R. Cohen; secretary, Mr. L. E. Thomson; treasurer, Mr. Marshall Cohen; committee, Miss E. Alleyne Sinnotte, F.B.E.A., Miss M. Helm, Mr. Clarence Kelly, Mr. G. Redfern, and Mr. H. V. Tilbury.

## NEKROLOGIO: JOHANO BOOTH.

Forpasis unu el niaj pioniroj. La 25-an de julio mortis sinjoro Johano Booth, magistro de inghenierado, submagistro de scienco, kiu estis eble la unua Esperantisto en Australio, kaj fondinto en 1903 de la Esperanta Klubo Melbourna, kiu ankorau vivas sub la nomo Australia Esperanto-Asocio. Sinjoro Booth estis dum jaroj entuziasma kaj energia laboranto, kaj nia afero multon shuldas al li por lia sindona laboro en la komenca periodo; ne malmulte helpis lia akademia rango: li estis eminenta ingheniero kaj membro de la konsilantaro de la Melburna uni-

versitato. En lia hejmo kunvenis la unua grupo, kaj la unuajn Esperantistojn de Melburno li mem instruis; kelkaj el ili restas ankorau nun fidelaj laborantoj en nia movado.

Sinjoro Booth alestis la sepan kongreson en Antverpeno kaj lia raporto pri la tiea praktika sukceso de Esperanto multe kuraghigis la Australiajn samideanojn.

Al la vidvino kaj familio de nia mortinta samideano ni prezentas nian respektan kaj sinceran kondolencon.

## BILANCO DE LA TRIA AUSTRALIA KONGRESO DE ESPERANTO

okazinta en Sidnejo de 3 ghis 8 aprilo 1920.

### Enspezo.

| | F. | sh. | p. |
|---|---|---|---|
| Kotizoj: | | | |
| Nova Sud-Kimrio . . . . . . | 29 | 0 | 0 |
| Aliaj provincoj . . . . . . . . | 25 | 1 | 6 |
| Novzelando . . . . . . . . . . | 4 | 10 | 0 |
| Donacoj . . . . . . . . . . . . . . | 2 | 4 | 9 |
| Vendo de biletoj por la havena ekskurso . . . . . . . . . . . | 4 | 10 | 0 |
| Vendo de pendajhoj . . . . | 1 | 15 | 0 |
| | 67 | 1 | 3 |

### Elspezo.

| | F. | sh. | p. |
|---|---|---|---|
| Nutrado (vizito al Zoologia Ghardeno, havena ekskurso, k. c.) . . . . . . . . . . . . . . | 15 | 10 | 0 |
| Luo de motorshipo . . . . . | 9 | 0 | 0 |
| Afranko . . . . . . . . . . . . | 5 | 19 | 0 |
| Presado . . . . . . . . . . . . . . | 6 | 4 | 7 |
| Luo de Salono . . . . . . . . | 3 | 10 | 0 |
| Veturado (shipe al Zoologia Ghardeno, trame, k. c.) . . | 1 | 13 | 1 |
| Reklamo . . . . . . . . . . . . . | 1 | 11 | 3 |
| Telegramoj . . . . . . . . . . . . | 0 | 7 | 6 |
| Komisipago je chekoj . . . . | 0 | 7 | 0 |
| Diversa elspezo . . . . . . . . | 2 | 4 | 0 |
| Acheto de kongresa filmo sendita al la Haga kongreso | 2 | 13 | 10 |
| Saldo . . . . . . . . . . . . . . . | 19 | 1 | 0 |
| | 67 | 1 | 3 |

La bilanco estas subskribita de la kongresa kasisto, sinjoro F. T. Simon; kaj sinjoro W. Lieber certigas, ke li ghin ekzamenis kaj trovis en ordo.

# LA LUIDORO

De François Coppée.

Ludoviko de Hem, vidinte sian lastan centfrankan bankbileton forrastitan de la bankisto, iris for de la ludtablo, kie li jhus perdis la lastajn restojn de sia malgranda havo, de li kunigitajn por chi tiu fina batalo . . .; li sentis kapturnighon kaj kredis, ke li tuj falos.

Kun konfuzita kapo kaj senfortaj kruroj, li sin jhetis sur la larghan benketon el ledo, kiu chirkauis la salonon. Dum kelkaj minutoj, li senatente rigardis la sekretan ludejon, kie fushpasis la plej belaj jaroj de lia juneco, rekonis la turmentatajn vizaghojn de la ludantoj, krude lumigataj de la tri grandaj lampoj, kaj auskultis la mallautan bruon de la oro sur la tapisho; li pensis, ke li estas nun senhavigita, pereonta, memoris, ke li havas hejme, en komoda tirkesto, la militajn pistolojn, kiujn lia patro, la generalo de Hem, tiam nur kapitano, tiel bone uzis en la atako al Zaatsha; poste mortige laca, li endormighis.

Kiam li vekighis, kun busho glueca, li konstatis, per rigardo al la horlogho, ke li dormis apenau duonhoron, kaj sentis nerezisteblan bezonon spiri la noktan aeron. La montriloj kushis sur la kvarono antau la noktomezo. Levighante kaj oscedante, Ludoviko subite memoris, ke nun estas la Kristnaska antautago, kaj, sekve de ironia efekto de la memoro, li revidis sin, kiam, ankorau bubeto, li metis, antau ol kushighi, siajn shuojn en la kamenon.

En chi tiu momento, maljuna viro, kutima ludanto, alproksimighis Ludovikon, kaj murmuris kelkajn vortojn en sia malpura griza barbo:

—Pruntedonu al mi kvin frankojn, sinjoro. De du tagoj mi ne forlasis la klubon, kaj de du tagoj la "dek-sepa" ne eliris. . . . Moku min, se tio plachas al vi; sed mi vetas, ke post momento, je la dek-dua, la numero eliros.

Ludoviko de Hem eklevis la shultrojn; li ne plu havis en la posho la monon necesan por pagi chi tiun imposton, kiun la kutimuloj nomis "la kvin frankoj de la almozulo." Li eliris en la antauchambron, surmetis sian chapelon kaj sian palton, kaj malsupreniris la shtuparon kun febra rapideco.

Dum la kvar horoj, kiujn Ludoviko pasigis en la ludejo, negho estis amase falinta, kaj la strato—unu strato de centra Parizo, mallargha, kaj randita de altaj domoj—estis tute blanka. Sur la klara, nigre blua chielo malvarmaj steloj treme brilis.

La senmona ludinto frostotremis e

sia palto kaj ekpashis, chiam returnante en la spirito malesperajn pensojn kaj chiam memorante la pistolan skatolon, kiu atendis lin en la tirkesto de la komodo; sed, post kelkaj pashoj, li subite haltis antau malgajiga vidajho.

Sur shtona benko starigita, lau la malnova kutimo apud la pordego de privata domo, ses- au sepjara knabineto, vestita de chifona nigra robo, sidis en negho. Shi estis endormighinta tie, malgrau la akra malvarmo, en sintenado terure montranta lacecon kaj subpremecon; shia kapeto kaj shia delikata shultro estis en angulo de l' muro kaj tushis la frostigan shtonon. Unu el la shuachoj de la infanino estis falinta de la pendanta piedeto kaj kushis tere antau shi.

Per nevola gesto, Ludoviko de Hem metis la manon en sian poshon; sed li memoris, ke antau momento li ne trovis en ghi ech unufrankan moneron, kaj ne povis doni trinkmonon al la klubo lakeo. Tamen, instigate de instinkta sento de kompato, li alproksimighis la knabinon, kaj li estis tuj prenonta shin en siajn brakojn kaj forportonta en sian hejmon, kiam, en la falinta shuacho, li ekvidis ion brilantan.

Li klinighis. Tio estis luidoro.

Kompatema persono, virino sendube, pasinte tie, estis vidinta, en chi tiu Kristnaska nokto, chi tiun shuon antau la dormanta infanino, kaj, memorante la kortushantan legendon, metis diskrete en ghin belegan almozon, por ke la malgranda forlasitino ankorau kredu al la donacoj faritaj de la Infano Jesuo kaj ne perdu, malgrau sia malfelicho, fidon kaj esperon en la boneco de la Providenco.

Unu luidoro! Tio estis kelkaj tagoj da ripozo kaj da richeco por la almozulino, kaj Ludoviko estis tuj shin vekonta por montri la moneron, kiam li audis en sia orelo, kiel en halucinacio, vochon—la tirata kaj kartava vocho de l' pruntisto—kiu murmuris mallaute chi tiujn vortojn:

— De du tagoj mi ne forlasis la klubon, kaj de du tagoj la "dek-sepa" ne eliris. . . . Mi vetas, ke post momento, je la dek-dua, la numero eliros.

Tiam chi tiu dudekjara junulo, posteulo de honestaj homoj, kies nomo familia estis famigita sur batalkampoj, kaj kiu neniam malhonore agis, havis teruran penson; li estis kapita de freneza, histeria, monstra deziro. Per unu rigardo li certigis sin, ke li estas sola en la strato, kaj, genuighante, singarde etendante sian tremantan manon, li shtelis la luidoron en la falinta shuacho. Poste, fulme kurante, li revenis en la ludejon, suprenkuris la shtuparon per kelkaj saltoj, pushis pugnobate la remburitan pordon de la malbenita salono, ghin eniris ghuste, kiam la horlogho sonis la unuan baton de noktomezo, metis la oran moneron sur la tablon, kaj kriis:

— "Plene sur la dek-sepa."

La "dek-sepa" gajnis.

Per movo de l' mano, Ludoviko pushis la tridek ses luidorojn sur la rughan.

La rugha gajnis.

Li faris ankorau la "paroli," duafoje, triafoje, chiam samsukcese. Nun antau li staris amaso da oro kaj da bankbiletoj, kaj li pudris freneze la ludtapishon. La "dek-duo," la "kolono," la "numero," chiuj kombinoj prosperadis al li. Estis eksterordinara, supernatura shanco. Shajnis, ke la buleto el eburo, saltetanta en la faketoj de la ruleto, estas magnetizita, ensorchita de la rigardo de chi tiu ludanto, kaj obeis al li. Per kelkdeko da fojoj, li regajnis la kelkajn milfrankajn biletojn, sian lastan vivrimedon, kiun li perdis en komenco de l' vespero. Nun, ludante du au tri cent luidorojn samtempe, kaj helpite de sia nekredebla bonshanco, li estis regajnanta pli ol la heredita kapitalo, kiun li disperdis en kelkaj jaroj, kaj restariganta sian richecon. En sia rapidemo al ludo, li ne estis demetinta sian felveston; jam ghiaj grandaj poshoj estis plenaj je bankbiletoj kaj je ormoneroj; kaj ne plu sciante, kien enshovi sian gajnon, li nun plenigis per mono kaj paperoj la internajn kaj eksterajn poshojn de sia jako, de sia veshto kaj de sia pantalono, sian cigarujon, sian poshtukon, chion uzeblan kiel enhavilon.

Kaj chiam li ludadis, kaj chiam li gajnis, kiel furiozulo! kiel ebriulo! kaj li jhetis plenmanojn de luidoroj sur la tablon, lauhazarde, senatente, per certa kaj malshata gesto.

Tamen, kvazaua varmega fero lin pikadis en la koron, kaj li pensis nur pri la malgranda almozulino dormanta en la negho, pri la infanino, de kiu li shtelis.

— Shi estas ankorau sur la sama loko. Nepre shi estas ankorau tie. . . . Post momento . . . jes, kiam batighos la unua . . . mi tion jhuras. . . mi eliros, mi shin prenos, ne vekante, en miajn brakojn, kunportos hejmen.

kushigos sur mian liton. . . . Mi shin edukos, dotos, amos kiel mian filinon, kaj mi zorgos pri shi chiam, chiam.

Sed la horlogho batis la unuan, la kvaronon post la unua, la duonon, la tri kvaronojn . . . kaj Ludoviko chiam sidis antau la infera tablo.

Fine unu minuton antau la dua, la bankiero levighis subite kaj laute diris:

— Oni forblovis la bankon, sinjoroj. . . . Sufiche por hodiau.— Ludoviko salte starighis. Dispushante krude la ludintojn, kiuj lin chirkauis kaj rigardis kun envia admiro, li rapide eliris, fulme malsupreniris la shtuparon, kaj kuris al la shtona benko. De malproksime, pro lumo de gasa lanterno, li ekvidis la knabinon.

— Laudata estu Dio!—li ekkriis.

—Shi estas ankorau tie.

Li alproksimighis shin, prenis shian manon.

—Ho, kiel shi estas malvarma! Kompatinda etulino!

Li premis shin al sia brusto por shin revarmigi, kaj, malkvieta, li volis, por shin veki el chi profunda dormo, kisi al shi la okulojn.

Sed tiam li konsciis kun teruro, ke la palpebroj de la infano estas duone malfermitaj kaj lasis vidi vitrecajn, malbrilajn, senmovajn pupilojn. Kaptite de terura suspekto, Ludoviko metis sian bushon proksime al la busho de la knabineto; neniu spiro eliris.

Dum, per la luidoro shtelita al la almozulino, Ludviko gajnis lude richecon, la senhejma infano estis mortinta, mortina pro frosto.

Premate je la gorgho per terura angoro, Ludoviko volis krii . . . kaj pro la farita peno li vekighis el sia abomena songho sur la benketo de l' blubo, sur kiu li endormighis antau noktomezo; la servisto, foririnte je la kvina matene, ne estis lin vekinta pro kompato al la senmonulo.

Nebula decembra matenrugho paligis la vitrojn de l' fenestroj. Ludoviko eliris, vendis sian posh-horloghon, sin banis, tagmanghis, kaj iris al milita oficejo por memvole soldatighi.

Nuntempe, Ludoviko de Hem estas leutenanto; li vivas nur per sia salajro, sed tio sufichas, char li estas tre bonkonduta, kaj neniam ludas kartojn. Ech shajnas, ke li shparis, char antau kelkaj tagoj, en Alghero, unu el liaj kamaradoj, kiu lin sekvis sur dekliva strato de la Kasba, vidis, ke li donis almozon al malgranda Hispanino dormanta apud pordo, kaj maldiskrete rigardis, kion Ludoviko donis al la malrichulino. La kamarado estis tre mirigata pro la malavareco de la malricha leutenanto.

Ludoviko de Hem estis metinta luidoron en la manon de la knabineto.—

El la Franca lingvo tradukis F-ino Favre.

---

## La "Santa Maria"

De Dorothea Mackellar.

Tri verdajn mejlojn sub la mar'
nia rabo glitis for;
kushas tie ship' kaj or':
chirkauas fishoj, algoj shin;
neniam ond' shin movos, char
Chiu pace dormu, do,
profunden shi suboighis tro.
kie mort' kushigis lin.

Senmova tie shipanar'
kushas depost la batal':
jen ludkuboj, jen pokal'.
(Ni falis kiel meteor',
frapante ilin sen fanfar').
Gemaj kruchoj por skelet'
valoras kiom sur parget'
de brigo che la lasta hor'?

Kiam subakighis shi,
babilis eta gargarson',
kvazau nur boato-dron'.
Faleme ni forvelis; ho,
nin vundis, mokis tragedi'!
Nia sulk' en okcident'
sangis, tremis—ja serpent',
ghis venis ni al Samballo'. . . .

Vagas monstroj tra l' palac'
en kajutojn, sur ferdek':
neniel zorgas estro, nek
sin movas iu pro terur'.
Mari', por ili estu pac',
kiuj havas en la ond'
pli verdan tombon, ol en mond'
sub lumo, varmo kaj lazur'.

El la Angla tradukis Maristo.

---

According to the Fundamento of Esperanto, instead of the accented letters we may use ch, gh, hh, jh, sh and u; this has bten done in the first two numbers of "La Suda Kruco." Incidentally this show that Esperanto can, if necessary, be printed (or typewritten or telegraphed) anywhere without the use of any accented letters.

# Why I should become a Member of an Esperantist Society.

## BECAUSE—

by doing so I shall assist in the following **Esperantist objectives:—**

(1) To make Esperanto the officially adopted Auxiliary Language of the World.

(2) To help to make War Impossible.

(3) To secure the introduction of Esperanto into the Schools.

(4) To encourage the production and reading of Literary, Dramatic and Scientific Works of International Importance, either by translation or in original.

(5) To facilitate International Trade, Travel, Congresses and Intercourse generally.

## BECAUSE—

by doing so I shall enjoy the following **immediate advantages:—**

(a) The Membership of a live Society, with definite objectives.

(b) The right to avail myself of a selection of International Literature, translated and original, already printed in Esperanto, as well as numerous Esperanto Journals.

(c) Taking part in the production of Esperanto plays, either as part of the audience or on the stage.

(d) Taking part in other Social undertakings, conducted by the Society for the benefit of Members and the advancement of the Esperanto movement.

(e) Undergoing, without extra charge, the course of instruction provided by the Society.

An eminently suitable Society is

## La Komerca Esperanta Klubo

MEETING AT THE

## Hardware Club Concert Hall

350 LIT. COLLINS STREET,
MELBOURNE,
On MONDAYS at 8 p.m.

Postal Address Box 731, Elizabeth Street P.O.)

Terms: 5s. per half-year. (A pro rata charge is made should you join late in the term.)

A. GODFREY, Hon. Secretary.

## LA KANTOJ DE SIDNEJO.

Unu allogo de la kongreso en Sidnejo estis la bonega kantaro de la Sidneja grupo, lau kiu la kongresanoj kantis en chiu loko kaj horo. Ni donas sube la vortojn de tri tiuj kantoj. La muziko estas havebla por 5 poshtmarkoj pri ghi. Ne en la libroj tro- (Box 1367, Elizabeth street P.O., Melbourne). Provu ilin en via grupo. La vortoj estas de sinjoro T. Caffrey, F.B.E.A.

### Amatino Mia.

Kiam shin mi vidas,
tiam el la kor'
gaje mi kantadas . . .
kantas al la flor'.

Rekanto: Belulino mia,
koro de anghel',
karulino dolcha . . .
mia rava stel'!
koro de anghel',

Kiam shi ridetas,
dancas mia kor';
gaje mi kantadas
vortojn de ador'.
Kiam shi benegos
per la blanka man',
tiam mi kantados:
"Estas mi amant'."

### Piknika Invito.

Ho, venu amikoj al nia pikniko,
por glui ghojecon kun gaja anar'!
Bonvenu al nia kampfesta kunveno . . .
Ho, venu al verda kaj bela kampar'
kun ni! Kun ni!
Ni iros al verda kaj bela kampar'.

Ho, inter la floroj, en fresha aero,
ni ridos, parolos la lingvon de l' koro...
tar';
ni ridos, parolas la lingvon de l' koro...
Ni amos en verda kaj bela arbar'
kun vi! Kun vi!
Ni amos en verda kaj bela arbar'.

### Kantu Esperante.

Nune kantu Esperante,
kantu kun la tuta mond'.
Supren levu vochojn laute
en felicha, viva rond'.
Diru al homaro tuta:
Gekunuloj estas ni.
Kantu per la lingvo bela,
ke gefratoj estas ni!

## "THE ESPERANTO GUIDE."

### Translation of the Exercises.

**Exercise 8.**—Donu al mi libro[n] Staru apud la patro. Kie estas la ch[a]pelo de Johano? Sur la tablo kune ku[n] la libro de la patro. Ludoviko stara[s] antau la domo kaj parolas kun Johan[o] pri la floroj. Diru al la frato, ke m[i] jam konas Teodoron. Ludoviko jam n[e] estas antau la domo; li jam estas en l[a] chambro kun Johano.

**Exercise 26.**—Kie vi estis hierau ve[s]pere? Ni estis en la teatro. Ni iris e[n] la teatron malfrue. Mi neniam eliras[,] kiam mi volas promeni, mi iras e[n] mian ghardenon, kaj promenas tie un[u] horon. La hundo saltis sur lin de su[r] la sofo. Li sidis sur chi tiu malnov[a] segho, kaj metis la piedojn sur chi tiu benketon. Jhetu nenion sub la tablo[n]. La birdo flugis en la chambron, sur l[a] tablon. Mi prenos chi tiun aferon su[r] min; estu trankvila. Kie li vojagha[s] nun? Li vojaghas en Anglujo (or Anglio) de kvar monatoj; li restos ti[e] ankorau du monatojn. Kie li estas[?] Li estas hejme. Kien li iras? Li ira[s] hejmen. Irante en vian chambron, m[i] trovis la hundon sur via lito. Esta[s] (or—Sin trovas; or—Trovighas) arbar[o] trans la rivero. La tutan tagon m[i] atendis sur la shipstacio, sed la ship[o] ne venis. Ni faras tion chi lau ordon[o] de niaj chefoj. Kvankam mi ne esta[s] richa, mi donus duonon de tio, kio mi havas, por savi ghin. Se vi scius kiu chi tiu homo estas, vi lin malesti[]mus. Mi petas vin iri pli rapide, cha[r] li estas, tre malsana. Kiel bele ka[j] kiel malofte estas pardoni! Rivereto vojeto: chambreto: aventureto: ri[] procheti; strateto; ekkrieti.

(Next month: Exercises 9 and 27.)

Cole's Book Arcade, Melbourne

Two Million Books and Pieces of Music
Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books.

**Free to You.**

8436—The T. H. Ould Publishing Coy. Chelt 21,